# TEJO-aktuale: numero 374, 2013-10-16

## NOVA REDAKTORO POR LA REVUO "ESPERANTO"

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo “Esperanto” havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabrício Valle estas elektita de la Estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 519, 2013-10-16) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=519

## Retgazeto aperigas esperantlingvan version

Disvastigo (http://disvastigo.esperanto.it) estas informservo, iniciatita fare de itala esperantisto Giorgio Bronzetti, kies morala heredaĵo pluvivas dankon al subteno de Itala Esperanto-Federacio. Laŭ liaj vortoj "spite al pli ol 100jara ekzisto esperanto, kiel lingvo kaj kiel valoro, estas nekonata aŭ tute miskonata. La imago kiu disvastiĝis ne kongruas ĝenerale kun la efektiva konsisto kaj potencialo de la projekto Esperanto. Tiu projekto signifas por ni antaŭ ĉio proponon al internaciaj instancoj de rimedo por defendo de lingvoj kaj kulturoj kaj, en la aplikado kaj uzo ekde ĝia naskiĝo ĝis hodiaŭ, transnacian mondkoncepton kaj inklinon al komprenemo". Pro tio, ekde ĝia apero, Disvastigo informas itallingve pri Esperanto kaj pri komunikadaj problemoj (diskriminacioj, progresoj, ktp.).

La informservo nun celas atingi du publikojn kaj liveri al ili novaĵojn ĉefe, sed ne nur, el la vidpunkto de esperantistoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj. Plue, ĝi proponas sian sperton, kunhavigante la eldonitan artikolaron al la internacia movado. Tial, jam de kelkaj semajnoj, Disvastigo havas regule ĝisdatigatan esperantlingvan version (http://disvastigo.esperanto.it/index.php/eo-eo/) kaj invitas ĵurnalistojn al kunlaborado.

## [Esperanto Sverige / Svedio] Vojaĝanta somero-2014 | La Vojaĝo

*Malsukcesa elŝuto.*

## Venu al la 24-a KISO (Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝO) por „ludi, krei, sperti vin mem” de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 2014

La Marburga Esperanto-Grupo kaj la Marburgaj Naturamikoj invitas vin al sunsomera 24-a KISO de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 2014. Ĝi okazas en la Naturamika Kabano, kiu situas en arbaro proksime al la urbo. Legu pli: http://www.esperanto.de/kiso

## {+svislando+} Video pri la nova epoko ĉe UEA

UEA - teamo, planoj, kapabligo' plej nova filmo de Katalin Kovats: http://www.youtube.com/watch?v=ĝjER6igRgY

## [SFERO 2013] Por ricevi informojn pri la venontaj SFERO-j

*Malsukcesa elŝuto.*

## Radio Esperanto de SAT-Amikaro

Radio Esperanto estas la radioprogramado de SAT-Amikaro. Ĝi estas elsendita ĉiu vendredo inter 17:30 kaj 19a de Radio Libertaire (89,4 FM).

Vi povas aŭskulti ĝin vive en la interreto tie : http://ecoutez.radio-libertaire.org:8080/radiolib.m3u

Vi ankaŭ povas aŭskulti antaŭajn elsendojn de Radio Esperanto. Por fari tion, iru en la krado programoj: http://media.radio-libertaire.org/

Elektu semajno, tiam en la kolumno vendrede je 17:30 alklaku la ligilon por aŭskulti la elsendon.

Alia interesa ligilon por eltrovi la konjugacio, la gramatiko kaj la vortrezoro de Esperanto. La vortrezoro estas prezentita pro temo.
http://fr.wikiversity.org/wiki/D%C3%A9partement:Esp%C3%A9ranto/Le%C3%A7ons_par_th%C3%A8mes

### [esperantic.org] KANADA TESTAMENTO KRESKIGAS LA RIMEDOJN DE ESF

*Malsukcesa elŝuto.*

### [ret-info] Popularaj sciencaĵoj - per interesaj bildostriaj rakontoj

*Malsukcesa elŝuto.*

### Venontaj renkontiĝoj

15a KEKSO, Wuppertal, Germanio, 22a ĝis 24a de novembro 2013, http://www.esperanto.de/kekso

39-a Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo, Nederlando, la 30-an de novembro 2013, http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=517#1

GIL-konferenco, Berlin, Germanio, 29a de novembro ĝis 1a de decenmbro, http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/neuigkeiten.php

Studsabato- en CDELI, La Chaŭ-de-Fonds, Svislando, 14a de decembro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

30a Internacio Festivalo, Nördlingen, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.internacia-festivalo.de

12-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 5-a Novjara Internacia Semajno (NIS) en Saarbrücken, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.esperantoland.org/nr kaj http://www.esperantoland.org/nis

5-a Junulara E-Semajno, Szczawno-Zdrój, Pollando, 28.12.2013 ĝis 04.01.2014, http://jes.pej.pl/2013/

Jarfina FESTego, Greziljono, Francio, 28a de decembro 2013 ĝis 2a de januaro 2014, http://gresillon.org/jarfine

SANO 4, Herzberg – la esperanto urbo, Germanio, 29a de decembro 2013 ĝis 2a de januaro 2013, esperanto-zentrum ĉe web.de

5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), 29a de decembro 2013 ĝis 4a de januaro 2014, Kotonuo, Benino, http://mirejo3.blogspot.com

5a Novjara Aranĝo (NOVA), Petropolo, subŝtato Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, 2-a ĝis la 5-a de januaro 2014, http://novjaraaranĝo.wordpress.com (Skribu x-kode)

Studsabato- en CDELI, La Chaŭ-de-Fonds, Svislando, 18a de januaro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

1a Internacia Esperanto-Kongreso en Nikaragvo, Granada, Nikaragvo, 24a ĝis 27a de januaro 2014, http://www.esperanto-nicaragua.org/eo/kongreso aŭ https://www.facebook.com/events/633860309978810/

Studsabato- en CDELI, La Chaŭ-de-Fonds, Svislando, 15a de februaro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

La 2a sudazia Seminario okazos en Lahor-urbo, Pakistano, 25a Februaro ĝis 1a Marto 2014, https://www.dropbox.com/s/zxoj3pyz0szrphm/UNUA%20BULTENO%20de%202a%20SAS%20en%20Pakistano.pdf

Studsabato- en CDELI, La Chaŭ-de-Fonds, Svislando, 15a de marto 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu